

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.)

N:o 7.
Juli 1914.

Redaktör:
R. PEHRSSON
Kraftverket, Älvkarleö.

Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND
Gävle.

Lösnummer 10 öre.
Årsprenumeration 1:20 kr.
Annonspis 5 öre pr mm.

Vem bör ha Nobels fredspris?

Jag skulle på denna fråga utan tvekan svara: d:r L. L. Zamenhof! Har någon gjort mer än honom för fredssaken? Jag tror knappast! Att han icke redan erhållit fredspriset är för dem, som känna d:r Zamenhofs arbete på detta område, mycket underligt, men kanske ändå ganska lättförklarligt. Man måste förklara saken så: De, som äro medlemmar i Nobelkommittén känna honom icke, förstå kanske icke vad hans arbete betyder för fredsidén. Men man skall icke mycket behöva studera Zamenhof och hans arbete förrän man måste förvånas över att fredspriset hittills gått honom förbi. Vilken fredsentusiasm införlivar icke endast »La Espero», »Hoppet», av Zamenhof — den hymn i vilkens anda hela esperantorörelsen går? Till svenska översatt blir innehållet, som följer:

I världen kom en ny känsla,
Genom världen går ett starkt rop;
På vindens lätta vingar
Flyger det nu från plats till plats.
Icke till svärd, törstande efter blod,
Drager det den mänskliga familjen
Till den evigt stridande världen
Den utlovar en helig harmoni.
Under det heliga hoppets tecken
Samlas fredliga stridande,
Och hastigt går saken framåt.
Genom arbete av dem som hoppas.
Fasta stå årtusendens murar
Mellan de åtskilda folken.
Men falla skola de envisa hindren
Av den heliga kärleken sönderslag-
na.

På en neutral språklig grundval
Förstående varandra
Skola folken i evighet bliva
En stor familjekrets.
Våra flitiga kamrater
I det fredliga arbetet skola ej tröttna,

Förrän mänsklighetens vackra dröm
Till evig välsignelse förverkligats.

Går icke hela innehållet ut på fredstanken? Och är icke Zamenhofs teori, att genom ett internationellt språk förbrödra folken, den mest fördelaktiga, är det icke den enda, som i praktiken kommer att stå sig? Jo säkert! Så länge språken skilja folken åt, och så länge som icke hela folket kan arbeta internationellt med gemensamma medel, så länge är en världsfred tvivelaktig.

Den större delen av esperantolitteraturen och alla esperantotidningar visa av sitt innehåll att de arbeta för fredssaken, ty esperantismen, d. v. s. den idé, som alltid följer esperanto är att genom ett hjälpspråk, ett alla folks gemensamma främmande språk, sätta alla jordens nationer i ett bättre förhållande till varandra. Det finnes folk, som hata vissa nationer, folkslag etc. Varför, veta de icke själva. De mena kanske, att de äro ociviliserade, råa barbarer o. s. v. Dessa fördomar försvinna dock, ju mer folken genom esperanto komma i förbindelse med varandra. Man skall då märka att man i Ryssland, Kina, Japan, Indien och överallt skall finna personer, lika högt stående i civilisation som hos oss själva. Därmed skall ett oberättigat nationalhat försvinna.

Man kan utan tvekan säga, att alla esperantotidningar äro fredstidningar; att alla esperantister, som

arbeta i esperantismens tecken äro fredsvänner och arbeta på ett praktiskt sätt för fredssaken.

Således måste Zamenhof, den person, som drivit världsspråksrörelsen längst och därmed hjälpt och fortfarande i esperantolitteraturen arbetar för fredsidén, mer än någon vara värdig fredspriset.

En person, som en tid studerat esperanto och esperantolitteraturen, drömde en natt, berättar han, att Zamenhof hade erhållit fredspriset. Han hade av vad han läst blivit så övertygad om att Z. var bland dem, som arbetat mest för fredssaken, att han var nästan säker på att drömmen var sann. Han måste sedan för att övertyga sig därom tala med flera personer. Han blev mycket förvånad när han fick veta att Z. icke ännu erhållit fredspriset. Det förefaller mig lika underligt!

Men som vi esperantister böra »leva på hoppet», så hoppas jag att i en icke avlägsen framtid få se Zamenhof som Nobelpristagare. Han är upphovet till en fredssarmé på flera millioner anhängare, en armé, som ständigt ökar och som snart i styrka, utan vapen, skall kunna mäta sig med alla krigsarméer världen äger. Den skall också segra över dessa.

Således anser jag Zamenhof vara den, som i första hand bör kunna hoppas på nästa Nobels-fredspris.

Einar Adamsson.



Vojaĝanto: Ĉu vi pasigis vian tutan vivon en tiu ĉi vilaĝo?
Vilaĝano: Ankoraŭ ne, sinjoro.

Al Malmö!

Post kelkaj tagoj okazos en la bela feste ornamita ĉefurbo de la suda Svedujo la tiu-ĉi-jara kunveno de la svedaj esperantistoj. En tiu ĉi lasta momento antaŭ la grava okazo ni direktas al ĉiu samideano, kiu eble ankoraŭ estas iom ŝancelema, ĉu li riskos la vojaĝon tien aŭ ne, alvokon, tuj forlasi ĉiujn dubojn kaj rapidi al tiu »kolektiĝo inter pacaj batalantoj». Kaj al ĉiu, kiu faris sian decidon viziti la Baltajn Esperantotagojn ni deziras plej koran bonvenon.

Koncerne la programon de la tagoj la loka komitato, kompletigante la provizorajn informojn en numero 5 de La Espero, donis la sekvantajn informojn:

Dimanĉon la 26-an: La partoprenantoj kolektiĝas en la salono de »Industriföreningen, Mäster Nilsgatan 1, 6,15 p. m.

La Esperanta flago flirtos sur la grandioza konstruaĵo! De tie per tramo al la Balta Ekspozicio, kie vespermanĝo okazas en la restoracio »Kastellet».

Lundon la 27-an kaj mardon la 28-an: Vizitado al la Balta Ekspozicio kaj ekskursoj en la urbo.

Merkredon la 28-an: K. ngresaj kunsidoj en la ejo de »Industriföreningen, kun komenco je la 10-a horo a. m.

Fine ni rememorigas, ke la adreso de la Esperanto-oficejo starigita por la kongreso estas S-ro Carl Rosengren, Amiralsgatan 15, Malmö, al kiu oni pagu la kongresan kotizajon, 3: — kr.



»Det internationella språket, som jag önskar Esperanto skall förbli för alltid, är en föreningslänk mellan nationerna över hela världen, det skall ingiva människorna världsmedvetande och bli ett mäktigt element i det allmänna framåtskridandet, bidragande icke blott till förståndets utan även hjärtats höjande genom att leda vår själ mot fullkomlighet, jämlikhet och broderskap.

B. Tsonev,

Prof. i filologi vid universitetet i Sofia.



Esperantos nytta.

Pariser-tidningen »La Petit Parisien» omtalar följande lilla exempel på Esperantos användbarhet:

En poliskonstapel Gallet i Neuville, Frankrike, hade sedan 30 år tillbaka ej haft något meddelande från sin bror, som lämnat sitt hemland strax efter det exercisen fullgjorts. Alla ansträngningar att finna honom voro färfästa och han började tro, att brodern länge sedan avlidit i utlandet. Ett svagt hopp levde emellertid ännu och han beslöt göra ett sista försök med hjälp av Esperanto och anförtrode härför sin sak åt sekreteraren i Esperantoföreningen i St. Denis, herr Bernard. Denne skrev till en mängd esperantister jorden runt och slutligen fick han från en esperantist i Brisbane, Australien, meddelande om att konstapel Gallets bror ännu var i livet. Samtidigt fick Gallet ett brev från brodern. Det behöver väl knappast tilläggas, att Gallet blev en övertygad anhängare av Esperanto!



Alvoko.

En Svedujo ni fondis nacian unuigon, »La Kamarada Unuigo». Krom ĉiuj bonaj punktoj en la programo de tiu ĉi unuigo, mi kiel unu el la fondintoj sukcesis en la programon enmeti la mondlingvan demandon. Tial ni nun en la programo havas tiun punkton, sed mi devas konstati, ke inter la fondintoj estas ankaŭ fervora idisto. Mi devas kompreneble kiel membro de la estraro labori kune kun li, tiel ke ni inter la membroj agitas kaj en la gazeto de la unuigo skribas, tamen mi pri Esperanto kaj li pri Ido. Mi do esperas, ke mi de la esperantistoj povos ricevi helpon en la propagando por nia lingvo inter la unuiganoj. Mi petas tial ĉiulandajn samideanojn skribi al nia sekretario, s-ro H. H. Sten, *Hammerdal*, kaj gratuli lin kiel la iniciatinton, por ke ni en la programo havas la mondlingvan demandon kaj deziri al li kaj la »Kamarada Unuigo» venkon per la helpo de Esperanto.

Krome, tiu unuigo ankaŭ celos kolekti ĉiujn svedajn gejunulojn

loĝantajn eksterlande. Nun mi, por montri tiamaniere la taŭgecon de Esperanto, petas ĉiujn svedajn gejunulojn eksterlande, aŭ ĉiujn eksterlandulojn, kiuj konas svedojn en sia lando, sendi iliajn adresojn al mi por ke mi povu sciigi ilin pri la novfondita unuigo kaj ĝia celo. Ankaŭ por la propagando mi akceptas ĉiujn esperantajojn.

Kun samideana saluto kaj antaŭdanko

Einar Adamsson,
Gävle, Svedujo.

Aliaj esp. gazetoj estas petataj represi kaj sendi la numerojn al mi.



Jam

Ordet *jam* anger att en förändring skett, sker eller kommer att ske. Den kända satsen »la infano jam ne ploras» angiver således att »la infano ploris», men att en förändring inträtt i detta förhållande. D. v. s. barnet har gråtit, men nu gråter det ej längre.

Av detta exempel framgår, att svenska språket icke har något ord, som till betydelsen fullt motsvarar *jam*. Ofta, men långt ifrån alltid, kan det emellertid översättas med *redan*, vilket ord i vissa fall har ungefär samma betydelse. »La viro jam estis maljuna» kan översättas med »mannen var redan gammal». La pluvo jam ĉesigkos post kelkaj minutoj: regnet kommer att upphöra redan om några minuter, men denna förändring har ännu ej inträffat.

»La domo jam ne estas konstruata» betyder antingen att huset är färdigbyggt eller att man av annan anledning upphört med byggandet. La domo estis konstruata, huset var under uppförande; i detta tillstånd har en förändring inträtt och sålunda: la domo *jam* ne estas konstruata.

Det är naturligtvis med Esperanto, som med alla andra språk, nämligen att man för att ledigt behärska språket måste uppnå ett stadium, då man ej längre (*jam* ne) grubblar över varje ordvändnings motsvarighet i modersmålet.

Jln.





Amerika.

Argentina. — Två kurser pågå i Bahia Blanca och en livlig propagandaverksamhet bedrivs. Bildandet av en Esperantoförening förberedes.

Brasilien. — Hur Esperanto börjar på att arbeta sig in även vid skolorna framgår bl. a. av att kurser i Esperanto nu öppnats vid två skolor i *Rio de Janeiro*: skolorna *Baggi de Araujo* och *Maria de Lacerda*. Därjämte avhåller Brasilianska Esperantoförbundet kurser i K. F. U. M. i samma stad. Kurser pågå vidare i en hel del städer: *Alagvas*, *Sergipe*, *Larangeiras* och *Caxambu* (vid normalskolan); i *Bello Horizonte* har en förening bildats.

Asien.

Japan. — Ett betydelsefullt tecken på Esperantorörelsens framåtskridande i yttersta östern är det stöd som framstående japanska vetenskapsmän redan länge visat Esperanto. Den kejserliga meteorologiska föreningen giver det officiellt sitt stöd och publicerar ej sällan i sin tidning *Kishoo Shushi*, som tryckes på japanska, på Esperanto skrivna artiklar av japanska vetenskapsmän.

Kina. — I *Kanton* har bildats en Esperantoförening med mer än 100 medlemmar. Kurs har öppnats.

Europa.

Danmark. — De danska esperantisternas förening anordnade under sitt majsammanträde i Köpenhamn en utflykt till Skeel-Giörlings, föreningens stiftare, grav. Medelst bidrag från in- och utländska esperantister har under vintern rests ett vackert monument åt denne esperantismens förkämpe.

England. — Ett flertal nya föreningar och kurser är resultatet av de engelska esperantisternas livliga verksamhet på alla områden. Bland nybildade föreningar märkas en i *Greenwich* och en i *Tufnell* (London); bland kurser en ombord på atlantterångaren »Runic» på resa mellan Australien och England. Kurser förberedas dessutom i flere skolor, så t. ex. i en högre flickskola i London, i tekniska skolan i *Harrogate* o. s. v. — En stor Esperantopris-

tävlan har anordnats för boy-scouts och redan ha omkring 200 scouter anmält sig.

Frankrike. — Vid en i *Grenoble* nyligen avhållen examen med elever från Esperantokurserna i stadens skolor deltog 127 lärjungar, varav 80 erhöilo premier. — I *Bordeaux* pågå f. n. fyra kurser, vilka staden understöder med ett bidrag av 75 kr. — Efter ett föredrag av den berömde flygaren *Archdeacon* har en kurs öppnats vid högre aeronautiska skolan i Paris.

Italien. — Två nya föreningar ha bildats: i *Busseto* och *Cremona*.

Portugal. — Den nybildade »Lissabons Esperantoförening» har börjat sin verksamhet med öppnandet av en kurs i Esperanto för nybörjare, varjämte den förbereder anordnandet av en korrespondenskurs. — Vid den nyligen i Lissabon avhållna kongressen för nationella handels- och industriförbund antogs enhälligt en resolution till förmån för Esperanto.

Ryssland. — En blind rysk esperantist, *Eroschenko* i Moskva, har påbörjat en resa till Tokio, vilken han ämnar företaga ensam och endast med hjälp av U. E. A. (Världsesperantoförbundet). Han företog förra året en liknande resa till England och de erfarenheter han därunder gjorde ha förmått honom att även göra denna långresa. — Efter många svårigheter har nu bildats en Esp.-förening i *Dorpat*, i det dess stadgeförslag godkänts av myndigheterna. Vid föreningens första sammanträde höllos föredrag om Esperanto på ryska, tyska, estiska och Esperanto.

Tyskland. — I anslutning till 9:e tyska Esperantokongressen i *Leipzig* ägde ett möte av esperantistiska lärare rum, varvid antogs en resolution, i vilken betonades behovet av ett förbund för Tysklands alla esperantistiska lärare. Efter förhandlingarna besågs den speciella Esperantoutställningen å den stora internationella utställningen av grafisk konst och bokhantverk.



»Ne nebuligu al vi la mondon»,
diras la abstinismo;

»Sennebuligu al vi la mondon»,
diras esperantismo.

D-ro L. L. Zamenhof.

En Germanujo.

Tri limerikoj.

Magistratano en Osnabruko
ne havis harojn sur sia nuklo.
Sed ne ŝatante ĉi-tiun staton
li fine aĉetis surogaton,
kaj kovris la nukon per peruko.

Ĉarma knabino en Bremeno
promenas en la urba ĝardeno
Ŝi efektive ĝuas
kiam la ŝvito fluas,
ĉar ŝi promenas pro higieno

Juna sinjoro en Stutgarto
naskiĝis la unuan de marto.
Post unu monato
li fariĝis akrobato,
tre lerta en sia arto



21a Internacia Kongreso pri paco en Wien.

15a ĝis 19a de Septembro 1914.

En Aŭgusto de la pasinta jaro la 20a Internacia Kongreso pri paco en Hago per akلامo decidis, okazigi la 21an kongreson en Wien. La pacifistoj en Aŭstrio ĝoje prenis sur sin la taskon de inda aranĝo de la festo kaj de afabla akcepto de kunlaborantoj, venontaj el ĉiuj landoj, por pritrakti la eminentan problemon de la mondpaco.

Oni preparos ĉion, por ke la kongreso en la belega urbo apud Danubo fariĝu ĉiurilate brila.

Gravaj temoj pri internacia rajto, pri internacia interkompreniĝo kaj pri interŝtataj organizoj reprezentas la ĉefajn punktojn de la programo, ellaborita de la internacia komisiono de la internacia oficejo por paco en Bern. En ĉiuj landoj eminentaj personoj akceptis referatojn, kaj la kongresanoj havos okazon, partopreni la diskutadon. La novtempaj postuloj pri garantio por la mondpaco estos deklarataj kaj la aktualaj problemoj pri internacia organizo disvolvataj.

Krom seriozaj laborkunsidoj ankaŭ estos aranĝataj festoj, je kiuj oni povos pridiskuti en pli intima formo diversajn aferojn.

La organiza komitato invitas al tiu kongreso ĉiujn societojn, insti-

tuciojn kaj privatajn personojn, kiuj deziras kunlabori aŭ subteni la laborantojn de la granda porpaca festo.

La 20an de Septembro la kongresanoj veturos Budapeŝton, kie ankaŭ okazos diversaj aranĝoj.

Samideanoj!


Klopodu, ke multaj esperantistoj partoprenu ĉi tiun kongreson. Nur tiel estos eble, organizi apartan sekcion de esperantistoj, en kiu oni povos diskuti per nia lingvo. Eksciante eventuale jam nun, kiu el viaj samlandanoj estas vizitonta la kongreson, vi eble povas uzi vian personan influon, ke li ĝis Septembro ellernu nian lingvon. Ju pli da eksterlandaj esperantistoj kunvenos, des pli grava kaj akcelanta estos la afero por nia movado.

Ĉiuj samideanoj bonvolu anonci sian intereson pri la kongreso al la redakcio de *German-Aŭstria Esperantisto*, Kaiserstr. 10, Wien VII. Se ilia nombro estos granda, oni certe sukcesos eldonigi la prospekton en Esperanto.

La samideanoj en Wien kun granda ĝojo salutos siajn eksterlandajn amikojn!

Sub la sankta signo de l' espero. Kolektiĝas pacaj batalantoj!

(El *German-Aŭstria Esperantisto*)



Amo kaj kopio.

Estis je la sesa horo p. m. La komercisto Holm ĵus fermis la kasoŝrankon, kiam ĝi frapis je la pordo.

»Eniru!» li diris.

La pordo malfermiĝis kaj juna viro, ĉirkaŭ 25-jara, envenis.

»Ho, estas vi s-ro Holm! Kun kio mi povas helpi?»

Pardonu, s-ro komercisto», Holm komencis, »mi venas por ekŝiĝi de mia ofico.»

Sed, kara Holm, kial do? Se estas io, kio ne estas bona, nur diru al mi; aŭ eble vi intencas edziĝi kaj fondi propran komercejon?»

Ne, s-ro Berg, Holm diris, kaj malforta ruĝiĝo aperis sur liaj vangoj. »Tie ĉi estas ĉio tiel bona, kiel mi povas deziri, kaj mi ne intencas edziĝi, sed tamen mi volas forveturi.»

»Nun mi ne komprenas vin,» diris la komercisto. »Sed se mi

plialtigus la salajron, eble estus pli bone?»

Mi pro tio estas tre dankema, sed mi tamen ne povas resti,» Holm respondis. »Mi devas for.»

»Tiam mi ne pli povas fari, sed kiam vi volas forveturi?» Berg demandis.

»Tiel baldaŭ kiel eble.»

»Bone, ni povas interparoli pri la afero alian tagon.»

Kiam Berg tiun vesperon hejmenvenis, li estis tiel pensplena, ke lia edzino devis demandi, ĉu li havis malbonajn komerciojn.

»Ne,» li respondis, »sed mia asistanto finos sian oficon ĉe mi. Mi ne scias, kiel okazos, se li forveturos. Mi havas nenium alian, kiu tiel bone konas la aferojn, kiel li. Krom tio mi konas, de kiu kaŭzo li finos. Estas tio, kio estas la plej malbona. Mi tamen faros, kiom mi povas, por ke li restu.» Post momento li diris: »Se Elsa estas hejme, petu ŝin enveni!»

»Bonan vesperon, paĉjo!» la filino salutis, kiam ŝi envenis al la patro, »ĉu vi volas paroli kun mi?»

»Jes, mia infano, mi volas paroli kun vi. Sidiĝu en la sofo kaj aŭdu. Ĉu vi konas s-ro Holm?»

»Jes, paĉjo, mi lin konas,» Elsa diris, mallevante la okulojn.

»Li nun finos sian oficon en mia komercejo kaj forveturos.»

»Kial vi priparolas tion al mi?» demandis Elsa kun iom vibranta voĉo.

»Mi esperas, ke vi volas helpi min restigi lin,» li diris ridetante.

»Ho, Patro, kiel malafabla vi estas,» Elsa diris kaj jetis sin al lia kolo. »Sed kiel vi tion scias? ŝi demandis modeste.

»Estas alia afero, kaj krom tio li plej kredeble priparolis tion mem», la patro diris.

La tagon post tio Holm estis vokata al la komercisto. »Mi deziras vidi vin je tagmanĝo hodiaŭ,» li diris, kiam Holm envenis. Tiu dankis kaj iris.

Kiam la horloĝo en la turo batis kvar kaj tridek, Holm supreniris la ŝtuparon al la hejmo de komercisto Berg, kaj estis tuj enkondukita de servisto. Envenonta li estis tuj akceptita de Elsa, kiu ĝoje lin salutis »Bonveninta!»

»Kara Oskar, kiel afable, ke vi venis; mi esperas, ke vi ne forveturos? Diru, ke vi restos!»

Ne, amatino, mi devas tion, se mi iam povos ricevi vin kiel edzinon. Sed tie ĉi ni ne povas sidi, mi devas eniri kaj saluti viajn gepatrojn.

»Bonveninta, s-ro Holm, sidiĝu! la komercisto diris, kiam la ĝejnuloj envenis.

La humoro dum la tagmanĝo estis iom premita, sed je la kofotrinko la komercisto diris:

»S-ro Holm, vi ĉiam dum la dekdu jaroj en kiuj vi estis en mia servo, kondukis vin bone kaj ordeme. Kiel malgrandan signon de mia dankemeco mi volas doni al vi tiun ĉi asignon; ĝi povas taŭgi kiel helpo por la vojaĝo.»

»Dankon, s-ro Berg», Holm diris, »sed mi nenium monon bezonas.»

Nenion dirante, Berg enpoŝigis la asignon, sed anstataŭe li elprenis maldikan travideblan paperon, sur kiu io estis skribita.

»Aŭskultu!» li diris. Tie ĉi mi havas folion el mia kopilibro, pri kiu mi petas permeson laŭte legi: »Miaj karaj gepatroj,» Berg komencis, »pardonu, se mi nun devas vin iom ĉagrenigi, sed mi ne alie povas. Mi venontan monaton plej kredeble veturos al Ameriko. Mi forveturos, ĉar mi amas la filinon de mia estro, kaj tial ke mi ankoraŭ estas tro malriĉa por peti pri ŝia mano. Ŝi min amas kaj promesis atendi ĝis mi revenos...»

Tie ĉi Berg finis kaj ekrigardis Holm.

»Kiel estus, se vi povus ricevi eblecon en tiu ĉi lando. Mi kredas, ke estas same facile kiel en Ameriko. Vi povas preni sur vin mian komercejon kaj provi. Ankaŭ vi povas preni sur vin mian Elsa; en alia okazo mi timas, ke ŝi iun tagon forkuros al Ameriko,» diris Berg ridetante. »Ankaŭ alian aferon, mi volas diri al vi, kara Holm: Kopiu neniam viajn privatajn leterojn en mia kopilibro, ĉar tia eraro ne ĉiam kunportas feliĉon!»

Tradukita el la sveda de Einar Adamsson.



Notoj pri Linné.

I.

La verkado de Linné.

El la svedaj verkistoj de sia tempo, Linné estis unu el la malmultaj, kies verkoj ankoraŭ estas ĝueblaj. Liaj sciencaj verkoj tamen nun ne povas interesi la grandan publikon. Liaj vojaĝaj priskriboj kontraŭe eĉ en nia tempo reeldoniĝas kaj estas legataj. La stilo de Linné hodiaŭ

estas opiniata kiel klasike bona, kaj kelkaj arĥaismoj ne difektas ĝian klarecon — ĝian tujan kompreneblecon. La glora esploristo tamen estis tiel okupata de sia scienco, ke li ne havis tempon por zorgi pri sia stilo, sed skribis kiel li parolis. La moda stilo de liaj samtempuloj cetere estis imitado de la franca klasika stilo kun ĝia trova ĝeneralligemo. Unufoje li mem konfesas pri sia skribmaniero, ke »ĝi estas tre simpla, kial mi kredeble estos severe juĝata de multaj el la najtingaloj de Plinio», sed li konsolis sin per tio, ke »se skribado estis permesita nur al majstroj de la elokventeco, la mondo hodiaŭ estus scianta malpli multe».

En la verkoj de Linné oni do oftege legas vivoplenajn priskribojn, malmulte pripensitajn antaŭ sia metiĝo sur la papero. Jen: »La vojo konsistis el ŝtono apud ŝtono, kun interlokita arbradikoj; tie ankaŭ estis profundaj kavoj plenaj je akvo, ĉar la pluvo kaj la frosto, kiu nun ĉesis en la tero, helpis reciproke. La branĉetoj pendis en la okuloj, kie ajn mi veturis, tute plenaj je pluvo.» Li tamen estis infano de la rokoko epoko, kaj tial liaj verkoj ofte odoretas de ĝia aminda spirito. Ĉe la komenciĝo de la printempa florado li do vidas, kiel »la bela Floro venas por dormi ĉe Febo».

La plej granda parto de la Linneaj verkoj kompreneble estas la sciencaj. El ili la plej ampleksa estas *Species plantarum* (La specoj de la kreskaĵaro), kiu estos priskribo pri ĉiuj kreskaĵoj konitaj de li. »En tiu ĉi verko», li mem diris, »kiun Linnæus ĉiam opiniis sia plej bona, li montris la scion, kiun li posedas en la botaniko — — — Ĉar multaj parolas pri tio, kion ili ne vidis, sed Linnæus parolas nur pri tio, kion li havis antaŭ la okuloj, kaj mem esploris.»



Alvokoj.

Alvoko al Studentoj!

Ni rememorigas al la Esperantistaj studentoj, ke la Dijon'a Universitato jam de pluraj jaroj sukcesplene organizis specialajn kursojn por fremdaj studentoj, kiujn jam vizitis sufiĉe multaj samideanoj.

Speciale atentindaj estas la libertempaj kursoj, kiuj daŭras de la 1 julio ĝis la 31 oktobro kaj kiuj konsistas el kursoj pri la franca lingvo (literaturo, fonetiko, historio, filologio kaj komerca lingvo). Ĉe la fino de tiuj kursoj la studentoj povas ricevi la diplomon pri franca lingvo. Por enskribiĝi neniuj pasporto, nek alia papero, nek diplomo estas postulata.

Ni uzas la okazon por ankaŭ atentigi, ke, dum la tuta jaro, ekzistas tiaj kursoj pri franca lingvo, kaj ke la fremdaj studentoj estas akceptataj en la normalaj kursoj pri juro, sciencoj, literaturo, medicino, farmacio. Speciale interesaj por fremduloj estas la kursoj pri enologio (vinscienco) kaj terkulturo, kiuj okazas en la Ŝtataj Enologiaj Institutoj de Dijon kaj Beaune kaj en la Beaune'a Vinberkultura Lernejo, kie lernas ĉiujare multaj ĉiulandaj (nome Rumanoj, Turkoj, Rusoj, Aŭstrianoj, Bulgaroj k. a.) studentoj kaj kies direktoro estas fervora Esperantisto.

Por ĉiuj informoj kaj por ricevi la senpagan universitatan gvidfolion oni sin turnu al la Del. de UEA en Dijon aŭ Beaune.

Ĉar ekzistas en Burgonjo multaj Esperantistoj, nome inter la profesoroj de la universitato kaj de la diritaj lernejoj, la studentoj nepre lernu Esperanton antaŭ ol veturi tien.

Th. Rousseau

Distr. Del. por Burgonjo.

Kongreso de pacifistoj Esperantistaj.

Vi demandu hazarde cent homojn ĉu ili aprobas la militstaton, ĉu ili deziras ĝian daŭron, almenaŭ naŭdek repondos, ke ege ili malŝatas ĝin, ke fervore ili deziras nefinigitan internacian pacon.

La homoj, kiuj laboras por la paco, proponas diversajn rimedojn.

Vi iru al cent homoj; vi parolu al ili pri unu el tiuj rimedoj, almenaŭ okdek el ili esprimos ege aŭ ete malaprobajn opiniojn kontraŭ ĝi.

La du ĉi-supraj asertoj ŝajnas ne kunigeblaj, ĉar efektive ĉiu konscias ke, kiu volas atingi rezulton, tiu akceptas uzi almenaŭ unu el la rimedoj al ĝi.

Sed tamen ili ambaŭ estas veraj: plej multaj homoj tre deziras la pacon, sed tamen ili multe emas malaprobi ĉiun rimedon paccelan ĝis nun proponitan por forigi la militeblecon.

Kaj tio estas la kaŭzo de tiu alia stranga okazaĵo: malgraŭ la multeco de l' pacamantoj, milito estas ankoraŭ ebla.

Efektive se ĉiuj, kiuj nomas sin pacamantoj, aprobus unu saman rimedon kapablan konstantigi la pacon, kaj sciigus tion, tia unuanimeco venkus ĉiujn barojn.

Konsekvence, temptaĝe estas, ke ĉiu pacamanto, kiu konscias pri la bedaŭrindegaj malutiloj de milito, ekzameni ĉu unu aŭ kelkaj el la diversaj rimedoj ĝis nun proponitaj por efektiviĝi la pacon ne estas forjetinda malgraŭ la malagrablaĵoj, kaj eĉ la malprofitoj, kiujn ĝi, uzate, naskus.

Tial,

Parizaj Esperantistaj Pacifistoj decidis organizi fakkongreseton dum la deka Internacia Kongreso de Esperanto.

Kotizaĵo estas du frankoj, kiu rajtigas ĉeesti ĉiujn kunsidojn kaj ricevi la raporton.

Aliĝojn akceptas *F. Brossier*, 44, rue de Turise, Paris.

Provizora programo:

- 1e Haltigo de l' armadoj (ĉiuregna, unuregna).
- 2e Forigo de l' armadoj (ĉiuregna, unuregna).
- 3e Malpligrandigo de l' armadoj (ĉiuregna, unuregna).
- 4e Ribelismoj porpacaĵ.
- 5e Arbitracio senescepta kaj deviga.
- 6e Regna federacio: ĉefaj trajtoj.
- 7e Devigrimedoj en federacio:
 - a) Bojkotado ekonomia (Projekto Bollack).
 - b) Militistaro internacia (Projekto Vollenhoven).
- 8e Diversaj projektoj de federacio (Novicow, Max Wächter, Brogajota ktp.).

Loka organiza komitato: S-roj Raguier, Lebreton, Finkelstein, Brossier, Bourreau.

Ĉiuj gazetoj estas petataj afable represi.



Varje medlem

av Svenska Esperantoförbundet erhåller *La Espero* gratis. Avgiften, 2: — kr., insändes till kassör *J. Helsing, Gävle.*

Bliv medlem!

Esperanto-kongreseto en la koro de Germanujo.

La 22—23 de aŭgusto en la bela urbeto Eberswalde (tre proksime de la metropolo Berlino) okazos la 6 Ligotago de la Brandenburg-Pomera-Esperanto Ligo.

La famaj vidindaĵoj de l' mondurbo Berlino certe allogos multajn samideanojn, kiuj partopreninte la Parizan kongreson reveturos tra centra Germanujo. Por niaj eksterlandaj geamikoj ni preparos bonan akcepton kaj spertan gvidadon en Berlino.

La partopreno al tiu kongreseto postulos mallongan kaj agrablan veturadon. La ĉarma situacio de l' supre nomita kongresurbeto pleje rekomendas aliĝi al tiu kongreso kaj komuna ekskurso de l' grandurbaj kaj provincaj esperantistoj, (specialaj honoraj, loka kaj amuza komitatoj agrabligos la restadon en Eberswalde).

Negermanaj interesuloj bonvolu peti informojn pri *senpaga* aliĝo ĉe s-ro Ernst Wichert, Charlottenburg, Scharrenstr. 32 a.

Eksterlandaj samcelanoj revenantaj el Parizo vizitu Berlinon.



Tra la ĉielo kaj la infero.

Rakonto por infanoj.

(De Viriato Correia.)

Foje... (Tiu ĉi rakonton oni verkis, en mia provinco, pri malbonŝanca kuracisto. Ĝi ne estas vere infana rakonto: pligustadire, estas rakonto de l' homa malboneco elpensita, por komprenigi la malfeliĉon de kompatindulo, kiu pasigis la vivon, ĝin detruante al la aliaj. Kiam mi fariĝis junulo, ĝi estis tre populara, eble ĉar tiutempe d-ro Baeta ankoraŭ ne estis mortinta).

Foje, estis jam tre malfrue, kaj la skriblaborado ĉe la ĉiela pordego ĵus finiĝis. Sankta Petro, kun granda ligajo de ŝlosiloj, ekiglis la ĉielajn pordojn de l' Paradizo.

Estis jam fermita unu el la pordoj, kiam delikate sonis, el ekstere,

la bruo farita de fingroj diskrete frapintaj.

La maljuna ŝlosilgardisto, tra la pordo, eligis la kapon:

— Kio estas, kamarado?

Estis viro ankoraŭ juna, kies tre freŝa vizaĝo montris melankoliajn okulojn, kvazaŭ li sopirus je la tero.

— Vi volas eniri, ĉu ne? demandis Sankta Petro. Ĉiutage okazas la samo, oni alvenas ĉiam lasthore, ĉe la laborĉesigo.

— Sed mi mortis antaŭ nelonge, kaj la vojo estas longa.

— Longa! Tamen pro tiaj aferoj la ĝenata estas mi. Eniru, kaj atendu apud la pordo, dum mi ekzamenas la registrolibroj.

Kiu estas via nomo?

— Manuelo Jozefo de Silva.

— El kie?

— El Rivero Klara.

— Ĉu vi mortis hodiaŭ?

— Mi mortis hodiaŭ.

La maljuna pordisto prenis en la bieto la libron de la tago, kaj metis la okulvitrojn.

— Manuelo. Manuelo. Manuelo.

— Jozefo de Silva, diris la mortinto.

— Manuelo. Manuelo. Manuelo. kaj li tralegis ĉiujn foliojn.

— Via nomo ne ekzistas tie ĉi. Hodiaŭ ne estas plu loko por ia Manuelo, ĉiuj jam ĉeestas. Kaj foriru tuj. Mi volas fermi la pordojn. Via loko estas en la infero.

Kion fari, se oni ne povas, post la morto, resti senŝirme, sub libera ĉielo, sen tegmento, elpelite?

Kion fari?

La malfeliĉa mortinto malgaje lasis la ĉielon, kaj vojiris ĉe la demonon.

En la infero, neniam ĉesas la laboro. Tage kaj nokte, pordisto atendas la gastojn. Estas pli da ĝentileco ol en la ĉielo. Alvenante, oni ne trovas iun Sanktan Petron malrapideme riglante la pordojn. La akcepto ĉiam afabla, ridema, vigla.

— Senceremonie, sinjoro, bonvolu eniri, estu kiel ĉe vi.

Kiam nia mortinto alvenis, ĉe la pordo estis granda amaso, kaj li estis devigata atendi ĝis kiam ĉiuj eniris, kaj fine venis lia vico.

— Manuelo Jozefo de Silva, el Rivero Klara; mi mortis hodiaŭ.

En la infero la librotenado estas mirinde organizita. Dum malpli ol kvaronhoro, oni povas koni la tutan doman movadon.

Ne malfacile la demono senespe- rigis lin:

— En la libroj ne estas registrita via nomo. Vi apartenas al la ĉielo.

— Ĝuste el tie mi venis. Ankaŭ tie ne ekzistas mia nomo.

Eksterordinara afero!

La demono pensis pri skriberaro. kaj sin ĵetis al la libraro, tralegantepaĝojn, foliumante paperojn.

— Neeble, via nomo ne estas ĉi tie, sed en la ĉielo.

— Tamen mi iris tien, kaj Sta. Petro ne ĝin trovis.

— Vi daŭrigos obstini pri Sta. Petro, kiu jam estas maljuna, kaduka, kaj ne plu taŭgas por tiu ofico. Verdire, oni malmulte laboras en la ĉielo, ĉar tien iras maloftuloj, malgraŭ tio, bezona estas iom da zorgo.

— Li tralegis la librojn kaj ne trovis. Ĵus finiĝis la taglaborado.

— Li tralegis nenion. En la ĉielo ekzistas aliaj registrolibroj. La librotenado estas malordigita. Sankta Petro malordegigis ĉion. Eble li ne zorge serĉis. Vi diris ke estis la horo finigi la taglaboradon: certe Sankta Petro, rapidante kun la deziro enlitiĝi, fuŝe ekzamenis la librojn! Tio malprosperas! Tie ĉi mi povas certigi ke ne estas via nomo. Mia kara sinjoro, iru al la ĉielo, via loko estas tie.

— Sed la laborado jam finiĝis, la pordoj estas riglataj.

— Frapu; ne estu stulta, frapadu. Se vi mortis hodiaŭ, vi devas eniri hodiaŭ. Tia estas la leĝo. Sur la strato vi ne povas resti. Atentu, mi ne proponas al vi liron ĉe ni tial ke ni ĉesigis nian rilatojn kun la ĉielo, kaj pro motivoj de ordo kaj honoro, ni ne gastigas la ĉielanojn. Vi ne povas resti senkovre, senlite. Iru, frapadu la pordon, bruegu, perforte malfermu ĝin.

La mortinto fine decidis reveni al la Paradizo.

Kia klopodo! La pordego preskaŭ falis. Fine aperis Sankta Petro, dormetema, kolera, frotante la okulojn.

— Nu, mi jam diris ke vi ne apartenas al ĉi tiu ejo.

— Tamen ankaŭ al la infero mi ne apartenas. Oni ne trovis mian nomon tie.

— Nek ĉi tie. Mi jam ripetis tion al vi.

— Faru al mi la komplezon denove ekzameni. Eble okazis eraro.

— Ĉu mi estas malsaĝulo? Mi jam diris al vi ke ne.

La mortinto daŭrigis insistadi kaj Sta. Petro cedis, ekelegis la registrolibroj:

— Manuelo Jozefo de Silva, el Rivero Klara, ĉu ne?

— Jes, via sinjora moŝto.

— Ĉu vi mortis hodiaŭ?
— Jes, mi estis operaciita de la kuracisto Baeta.

Sankta Petro frapis la frunton.
— Vi devas tuj esti dirinta tion. En tio kuŝas la dubo. Vi estis operaciita de la kuracisto Baeta!

— Jes, sinjoro.
— Jen la afero!

Kaj li ree foliumis la paperkollekton.

— Estas ĉi tie, via nomo estas ĉi tie. Vi estis mortonta post dek kvin jaroj. Sed doktoro Baeta kuracis vin, kaj vi mortis pli frue. Kial vi ne tion diris tuje? Pro tiu fakto, vian nomon ne enhavas la hodiaŭa registrolibro. Vi devus morti nur post 15 jaroj. Eniru.

En mia provinco, kiam mi fariĝis junulo, tiu ĉi rakonto estis tre populara.

Tradukis

A. Caetano Coutinho

El Brazilia Esperantisto.



Libroj kaj gazetoj.

In Memoriam de Tennyson, trad. de A. E. Styler. Eld. de la Brita Esp. Asocio, 17 Hart Street, London. Prezo 75 sd.

Kun nemiksita ĝojo oni povas saluti tiun ĉi novan aldonon al la kolekto de esperantigitaj literaturaj aĵoj de la plej eminentaj verkistoj de la mondo. »*In Memoriam*» estas unu el la verkoj de la fama angla poeto Tennyson. Kiel la titolo montras la libro estas dediĉita al foririnta amiko; en sentoplenaj, kelkfoje plendantaj, melankoliaj, kelkfoje rezignaj versoj la poeto senafekte esprimas sian malĝojon. Kvankam ofte profundiĝante en meditadoj kaj filozofadoj, la aŭtoro konservas simplan plaĉan stilon, kiu ankaŭ estas bone konservita en la traduko. Ĝi estas nova frapanta pruvo de la poezieco de nia lingvo, honoranta la tradukinton.

Ne juĝu! Nuntempa originala esp. romano de D-ro Leunbach, 1-a parto. Ĉe Andr. Fred. Höst & Sön, Kopenhago.

Prave la aŭtoro nomas sian romanon »nuntempa«. Ĝar ĝia temo estas ĉerpita el la diversaj sociaj fenomenoj de la nuntempo, la tempo de reformoj, kiuj en la aŭtoro evi-

dente havas sinceran probatalanton. La celon de la libro, la aŭtoro klare esprimas, dediĉante ĝin al »ĉiu, kiu libere staras». Kaj certe oni ne povas eviti esti impresata de la tre interesa enhavo de la libro. La stilo de la aŭtoro estas simpla kaj facile komprenebla, sed eble kelkloke iom peza. Se mi ne eraras la verko estas la unua de sia aŭtoro, kaj en tia okazo ĝi estas rimarkinda.

Pri la kredo al mirakloj de Wilhelm Winsch. Eld. de Ader & Borel, Berlin, Prezo 25 sd.

Kun kreskanta intereso oni legas tiun ĉi verketon. En science zorga kaj kritika maniero la aŭtoro esploras diversajn el la mirakloj priparitaj en la Biblio, tiuj mirakloj, kiujn tiel multaj nuntempaj homoj rifuzas kredi. Kaj li klare montras, ke tion, kion oni tiutempe opiniis mirakloj, oni nun ofte facile povas klarigi kiel ordinara natura fenomeno. Kompreneble la klarigoj donitaj de la aŭtoro restas nur hipotezoj, pli aŭ malpli konformaj kun la vero, sed oni devas konstati, ke ili ĝenerale ŝajnas prezenti la ĝustan solvon de la problemoj. La libro tute ne estas ia atako kontraŭ la Biblio, nur al la nekritema maniero, en kiu oni legis ĝin. — La traduko estas neriproĉebla kaj la libro entute tre rekomendinda.

Ro Po.



Korespondado

Anonceto pri korespondado kostas 40 oeroj (2 respondkuponoj).

Francujo. — S-ro A. Fourre, La Fosse-Corduan, *Aube*, deziras korespondadi per il. poŝtkartoj.

Francujo. — S-ro H. Eiessen, 28 strato Bufon, *Dijon*, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

Norvegujo. — S-ro Martin Sandvig, Skolegaden 10, *Trondhjem*, deziras interŝanĝi poŝtkartojn.

Germanujo. — S-ro K. Nepitsch, Stefanienstr. 47 I, *Augsburg*, dez. korespondadi per poŝtkartoj.

Brazilio. — S-ro Ismael Gomes Braga, *Teixeiras*, Minas, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi maloftajn poŝtmarkojn.

Germanujo. — S-ro Hans Düffels, Jägerstrasse 5 I, *Cassel*, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj.

PARIS 1914!

.....

Vi devas legi en la arte ilustrita

KONGRESA GAZETO

la cirkulerojn de la Organiza Komitato; la informojn de la Komisionoj; la praktikajn konsilojn de M. Z. A.; la artikolojn de famaj Esperantistoj; la respondon al ĉiuj viaj demandoj.

SED

por legi tion, necese estas ricevi la Gazeton.

Ricevos ĝin nur la jam aliĝintaj *Kongresanoj*.

VI ALIĜU!

Se vi aliĝos ekzemple en Marto, la unua de vi ricevota numero estos la Aprila.

La unua numero aperos en Januaro 1914.

Från

La Esperos expedition, Gävle,

kan rekvireras:

Läroböcker:

Lärobok i Esperanto av G. H. Backman	1: —
Lärobok i Esperanto av P. Nylén	1: —
Lärobok i Esperanto av Carl Ohlsson	0: 50
(Alla med Esp.-svensk ordlisto).	
Esperanto språklära av O. W. Hjærtstätt	0: 40
Esp.-svensk och svensk-esp. ordbok av O. W. Hjærtstätt	0: 60
Svensk-esp. ordbok av E. L:son Finn	1: 50

Sveda Kantaro, kun melodioj 0: 35
Esperantista Kantaro, » 0: 75

Nova Testamento (afrankite)... 2: 50

Esperanto-stjärnor	0: 75
Esperantoflagga (bordsflagga)...	2: 40
d:o (något enklare)	1: 75
d:o (mindre)	0: 85
d:o d:o	0: 50
d:o (miniatyr)	0: 15
10:e världs-Esperantokongressens officiella vykort. 1 duss.	
1: — kr.	1 st. 0: 10
d:o reklammärken, 100 st.	
1: — kr.	1 st. 0: 02

HERRAR

ekipera sig bäst och fullständigast hos

Axel Lidholm

Drottninggatan 30 - - GEFLE

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

Presenter inköpta hos
Juvelerarefirman

A. U. Wahlberg, Gefle
äro alltid välkomna.

Filial i Bollnäs.

Josef Wikströms

Tobakshandel

GEVALIAPALATSET - GEFLE

Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

Carl Larssons

FOTOGRAFIATELIER

NYGATAN 34

Rekommenderas!

TELEFON 357

SKODON

Största sortiment hos

A. M. Zimmerman & Co



C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSAFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

RIKSTELEFON 1697.

Sport- & Fotografiska artiklar

A.-B. Axel Karlstrand

Rikst. 12 27 GEFLE Rikst. 12 27

La Espero

utgives av Gefle Esperanto-
förening och utkommer
omkr. den 15 i varje månad.

Lösnummerpris 10 öre.

Prenumerationspris Kr.
1: 20.

Prenumeration kan ske
dels direkt hos tidningens
expedition, **Gefle**, dels ge-
nom återförsäljare eller på
posten.

Återförsäljare önskas på
varje plats! Provision om
flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare er-
hålla 20 öre för varje anskaf-
fad prenumerant, om minst 5
prenumerationsavgifter in-
sändas samtidigt.

Abonprezo ekster Svedujo
1:00 Spesmilo. (12 numeroj).

Specimeno kontraŭ re-
spondkupono. Mendo ĉe
R. Pehrsson, 3—23, Gefle.

PROVU LA KOPIOKRAJONON

ESPERANTO!

3:— kr. por dekduo. 30 oeroj por unu.

W. WAHLUND, GEFLE

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE

Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

Gust. Holms Förstoringsanstalt

Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 16 28.

Utför förstoringar efter fotografi.
Förstklassigt arbete. Begär priskurant.



N. Lundgren

GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 750 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra brikejo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.

Argenta medalo en Stockholm 1897
, , , Gefle 1901
, , , Norrköping 1906

Gust. Holms Förstoringsanstalt

Brunnsgatan 78, Gävle. □ Tel. 1628.

Faras pligrandigojn laŭ fotografaĵoj.
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

Kafé Linnéa

(Nykterhetsvännernas Kafé)

NYGATAN 34 - (Pousettska huset)

■ TELEFON 859 ■

Frukostar, Middagar och Soupéer.
Smörgåsar, Kaffe, The o. Choklad m. m.
Beställningar för mindre sällskap.

LOVISA HÖRLIN.

La Nova Testamento.

Nya Testamentet på Esperanto.

Inb. i läderband med förgyllt snitt
2: 50 kr. portofritt.

La Esperos expedition, Gefle

Läroböcker i Esperanto.

Kurs i Esperanto av **G. H. Backman**,

25 öre

Lärobok i Esperanto, med Esp.-svensk
ordbok av **P. Nylén**, 1:— kr.


Erhållas hos **La Esperos redaktion**,
3—23, Gefle.

Ozarowsky & Pehrssons

Bleck- & Plåtslageri

N. Kopparslagaregatan 15, Gefle

○ TELEFON 188 ○



Finna Esperantisto

Officiala monata organo de Esperanto-Asocio
de Finnlando. ○ Abonprezo 3:— Fmk.

Adreso: **S-ro Albin Sandström**,
11, Köpmansgatan, Helsingfors.